Heinrich Heine,

# Sur flugiloj de la kanto

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

Sur flugiloj de la kanto
Al Gango vi lasu vin
Forporti de via amanto
Al plej bela lok´, karulin´.

Jen kuŝas en la lunbrilo
Floranta lotus-ĝarden´,
Aperas en la trankvilo
Sorĉigaj feinoj jen.

Karese la violetojn
Subridi jen aŭdas vi,
Rakontas odorajn sekretojn
La rozoj inter si.

Gazeloj alsaltas maltime,
Mallaŭte nur tra la aer´
Aŭdigas de malproksime
Susuro de l´ sankta river´.

Ni volas ekkuŝi tie,
En arbareto sub palm'
Ripozi kaj am-ebrie
Sonĝadi en nokta kalm'.

*Traduko de la Germana poemo "Auf Flügeln des Gesanges" de* Heinrich Heine *(∗1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de* Manfredo Ratislavo *(Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, ∗1938-11-04).*

*Arg-540-1080 (2010-05-23 23:03:44)*

*El la „Libro de l´ Kantoj", lirika intermezo.*